

Pola Esperantisto

Monata organo de Polaj Esperantistaj Societoj

Administracio: Hozo, n.º 40, m. 8.

VARSOVIA

Jarabono, 5 fr.



KAPELOJ KAJ (A)POJ

ONI VENDAS ILIN MALALTPREZE

Manuelo Ballepi

Strato Ample, 51, apud Regomir
BARCELONO - (KATALUNUJO)

SOCIA KURACISTO

Duommonata organo en rusa lingvo, eldonata de la «Societo de rusa kuracistaro», enhavanta tradukojn el esperantaj gazetoj kaj en ĉiu kajero sciigojn pri la sukcesoj kaj disvastigo de Zamenhofa lingvo tra la mondo.

Adreso:

Moskvo, Arbat, Deneznij per. 28, kv. 5, v. redakciu Pirogovskago Ĵurnala.

LA DU STELOJ

Monata gazeto de Ĉiĉa Esperantista Asocio, sola esperantista propaganda gazeto «irante rekte al ĉiuj». En Esperanto kaj hispana lingvo, kun ilustraĵoj.

Redakcio kaj administracio:

Ĉiĉa Esperantista Asocio, Casilla, 728
SANTIAGO CHILE

Jarabono, 2 Sm. (Fr. 5)

LINGVO INTERNACIA

Centra organo de la Esperantistoj.

La plej malnova el ĉiuj esperantistaj gazetoj.

Administracio: Presa Esperantista Societo:

55 Rue Lacépède. PARIS

JARABONO

Sen literatura aldono Fr. 5'00

Kun aldono Fr. 7'50

TUTMONDA ESPERO

(KATALUNA ESPERANTISTO)



Tutmonda Espero

(KATALUNA ESPERANTISTO)

Organon de la kataluna esperantistaro

Aperas ĉiunonate en esperanta kaj kataluna lingvoj; kataluna literaturo; enlanda kaj eksterlanda movado; sciigoj pri la Barcelona Kongreso; k. t. p.

JARE 3 fr. (1'20 sm.)

ANONCOJ

Tuta pago . . . 12 frankoj. (3'80 sm.)

Duono da pago . . . 7 . . . (2'80 »)

Kvarono . . . 3'50 » (1'40 »)

Okono . . . 2 » (80 sd.)

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Paradis, 12 - BARCELONO

Pri administraciaj aferoj sin turni al S-ro Ribera, Rancich, 5 «El Ingenio», L'Ullivendic, Barcelono.

Barcelona, Februaro 1909^a

35 cent.

ESPERANTA
PRESEJO



Strato Asalto, 45
- BARCELONO -

ESPERANTISTA GAZETARO

Gazetoj redaktitaj en Esperanto kaj naciaj lingvoj

AFRIKO

Afrika Esperantisto. France k. Esp. — Senpaga. — 4, Rue du Marché, Argel.

AŬSTRALIO

The Australian Esperantist. — Ang. k. Esp. — 3 pecoj (unu numero). — Bridge Street, Brunella (State of Victoria).

BOHEMLANDO

Časopis Českých Esperantistů. Boheme k. Esp. — 375 fr. — Austrio, Praha.
Bohema Esperantisto (Český Esperantista). Boheme k. Esp. — 375 fr. — Praha III, 495

BELGLANDO

Belgia Esperantisto. France Flandre k. Esp. — 15 fr. — 29 Vondelstraat, Antwerpen.

BRAZILLANDO

Brazila Revuo Esperantista. Portugale k. Esp. — 6 fr. — Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.

BRITLANDO

The British Esperantist. Angla k. Esp. — 4 fr. — Brita Esperanta Asocio, Museum Station Buildings, 136 - 6, High Holborn London, W. C.
La Esperanta Instruisto. Angla k. Esp. — 250 fr. — 8, Pitman, 35, Fleet Street, London, E. C.

BULGARLANDO

Lumo. Bulgare k. Esp. — 5 fr. — Adm.: J. Neukov Strato sv. gorska n.º 39, Tirnow Bulgaria.
Bulgara Esperantisto. Bulgare k. Esp. — 150 fr. — Sofio.

CENTRA AMERIKO

Centrameriko Esperantista. Kastilo k. Esp. — 8 fr. — Sur. 11, Canton Libertad (Guatemala).

ĈILLANDO

Ĉilo Esperantista. Kast. k. Esp. — 2 fr. — Calle Maipo, 417, Altos.
La de Stoj. — Kastilo k. Esp. — 2 sm. — Calle de la Catedral, 1437, Santiago de Chile.

DANLANDO

Dana Esperantisto. Dane k. Esp. — Gyldenløvesgade, 16 Kopenhago.

FILIPINA INSULARO

Filipina Esperantista. Angla, Kastilo k. Esp. — 8 fr. — P. O. Box, 326, Manila.

FINNLANDO

Finna Esperantisto. 3 fr. — Harejo Esperantista Helsinki.

FRANCLANDO

Franca Esperantisto. 4 fr. — 46, Boulevard Magenta Paris.
Paris Esperanto. France k. Esp. — 150 fr. — Adm.: Chaussegros, 4, Place Jussieu, Paris.
Tra Pariso. France k. Esp. — 2 fr. — Adm.: Clément Vachet, 33, Rue Radziwill, Paris.

GERMANLANDO

Germana Esperantisto. Germana k. Esp. — 4 fr. — Esperanto Verlag Müller und Boral, 95, Prisonstr., Berlin, s.
La Saksia Esperantisto. — 1 fr. — Sro. Fritz Stephan, en Leipzig.

La Bela Mondo. — 6 mk. — Bismarkplatz, 13, Dresden.
Germana Esperanto Gazeto. — Germ. k. Esp. — Mk. 4. — Pionierstrasse, 21, Magdeburg.

HINDLANDO

La Pioniro. 5 fr. — R. F. Vaughan, Marikuppam, Mysore State.

HISPANLANDO

La Suno Hispana. Hispana k. Esp. — 3 fr. — Rafael Dujos, Cirilo Amorós, 23, Valencia.
Hispana Revuo. — 3 ptas. — Echégaray, 17, I.º Madrid.

HOLANDO

Amsterdamia Pioniro. Holande k. Esp. — 350 fr. — Singel, 386, Amsterdam.

HUNGARLANDO

La Verda Standardo. Hungaro k. Esp. — 4 fr. — Marich Agoston, Papoovella-utca, 6, Budapest.

ITALLANDO

Roma Esperantista. It. k. Esp. — 3 fr. — Via Baduino, 193.

JAPANLANDO

Japana Esperantista. Angla, Japane k. Esp. — 260 fr. — 3 come Jutakco, Kojimaeck, Tokio.

KATALUNLANDO

Tutmonda Espero. (Kataluna Esperantisto) «Organo de la kataluna esperantistaro». En Esperanto kaj Kataluna lingvoj. — 3 fr. — Paradis, 12, Barcelono.

MEKSIKLANDO

Meksika Revuo. 25 fr. — Cocheras, 2, México.
La Verda Stelo. 5 fr. — 5.º del Belox, 12, México.

PERULANDO

Antauen Esperantistoj. Kastilo k. Esp. — 3 fr. — Dro. F. Villarreal, Apartado 927, Lima.

POLLANDO

Pola Esperantisto. Pole k. Esp. — 250 fr. — 26, Marsalkowska, 113, Varsovio.

RUSLANDO

Ruslanda Esperantisto. Ruse k. Esp. — 750 fr. — Nikolaevskaja Str., 33, log. 21, Peterburg.
Espero. — Ruse k. Esp. — 10 fr. — Nevskij pr. d. 147 S. Petersburg.

RUMANLANDO

Rumana Esperantisto. — Rum. k. Esp. — 4 Leo: 5 Str. I. C. Bratianu.
Rumana Gazeto Esperantista. — Rum. k. Esp. — 126 sm. — Strada Speranta, 1, Galatzo.

SVEDLANDO

Esperantisten. Svede k. Esp. — 550 fr. — Pethlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

SVISLANDO

Swisa Espero. 3 fr. — R. Bovy Lisberg, Genevo.

USONO

L'America Esperantista. Angla k. Esp. — 5 fr. — 1252, Michigan Ave, Chicago.
Amerikan Esperanto Journal. Angla k. Esp. — 5 fr. — Boulevard Station, Boston (Mass.).
The Esperanto News. — Ang. k. Esp. — 2 sm. — Wall Street Romm, s/o, New York, City.

TUTMONDA ESPERO

(KATALUNA ESPERANTISTO)

Ĝiunonata revuo organo de la kataluna esperantistaro

Redakcio kaj Administracio: Paradis, 12 - BARCELONO (Societo «Espero Kataluna»)

2^a Jaro

Barcelono, Februaro 1909^a

N-ro 14

ENHAVO: II^a CIRKULERO PRI LA V^a INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO. — FLORAJ LUDOJ. — EL USONO. — TAJLORA KURAGECO. — LETERO EL KUBO. — CARTA DE CUBA. — AL LA GEINSTRUISTOJ. — MOVIMENT ESPERANTISTA CATALA. — KATALUNA ESPERANTISTA MOVADO. — MOVIMENT ESPERANTISTA MONDIAL. — DIVERSAJ SCIIGOJ. — GAZETARO ESPERANTISTA.



II^a CIRKULERO PRI LA V^a INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO

AL LA ESPERANTISTARO:

Fam pasis unu monato, de kiam ni dissendis la unuan cirkuleron; la dato de la kongreso alproksimiĝas laŭ gigantaj paŝoj; tion ĉi ni ne forgesas, kaj ni senĉese laboras. Ni deziras ke, ankaŭ tiu rapida alproksimiĝo ne estu forgesata de la aliĝontoj al la kongreso, kies Komitato, kiel estas dirite, disvendis la kartojn po 10 frankoj (4 sm) ĉiu.

Ni havas la plezuron sciigi ke, oni jam proponis por la karto numero 1, la kvanton de 20 frankoj (8 sm); ni notis la nomon de la proponanto S-ro Edwara Martins en la listo kiu estos fermata kaj ekzamenata la 5^{an} tagon de Aŭgusto je noktomezo.

Car la sendo de mono al nia kaso estas malfacila pro la manko de internaciaj poŝtmandatoj en hispana poŝtadministracio, ni konsilas niajn samideanojn sendi la monon kun la aliĝo al unu el la jenaj sinjoroj, kiuj tie ĝentile proponis al ni sian servon:

CENTRA OFICEJO - 51, Rue de Clichy. Paris.

S-ro Carlo Bourlet - LA REVUO - 79, Boulevard St Germain. Paris.

Barono F. de Ménil - FRANCA ESPERANTISTO - 46, Boulevard Magenta. Paris.

S-ro H. F. Höveler - ĈEFBANKO ESPERANTISTA - Merton Abbey. London S. W.

LOĜADO. — Kutimo estas en nia lando, manĝi en la sama hotelo kie oni dormas; do, la prezo de loĝado kiun ni atingis de la «Societo de Hotelestroj», rajtigas al ĉambro kaj al la ĉiutagaj tri manĝoj.

La diferenco de prezoj rilatas nur al komforto, sed ni povas diri ke, hoteloj por la plej malalta prezo (klaso A), estas jam kvankam simplaj, tre konsilindaj al ĉiu.

Fen la prezoj:

Klaso A.	Dormoĉambro kaj maten- tag- kaj vespermanĝo, po persono.	5 frankoj
» B.	» » » » » » » »	7.50 »
» C.	» » » » » » » »	12.50 »

FORMULOJ

por sendi mendon de kongreskarto kaj (aŭ) loĝado kaj eldonaĵoj de la Komitato al la nomitaj sinjoroj;


S-ro (N.);

Bonvolu mendi je mia nomo, al la Organiza Komitato de la V^a Kongreso, unu kongreskarton: mi kunsendas al vi la pagmonon. **10 frankojn**
 Bonvolu mendi je mia nomo, septagan bileton por loĝado, klaso; mi kunsendas al vi la pagmonon. »
 Bonvolu ankaŭ mendi je mia nomo, ekzemplerojn de la oficiala poŝtkarto n^o 1, kaj de n^o 2: mi kunsendas al vi la pagmonon. »

Subskribo

(Nomo de la mendanto, plena adreso, profesio, nacieco.)

Por havigi monon al la kongresa kaso, la Komitato eldonis du poŝtkartojn, unu por la plena Komitato (n^o 1), kaj alian por la «Floraj Ludoj» (n^o 2). Ili estas vendeblaj laŭ tiu ĉi tarifo:



II^a OFICIALA POŝTA KARTO

ekzemplero
 Poŝtkarto n^o 1, 5 cent.
 » n^o 2, 10 »

(Aldonu 5 centimojn po deko da kartoj por la afranko).

La Subkomitato de la «Floraj Ludoj» kiu tre fervore laboras por la sukceso de tiu grava festo, konsistas el;

D-ro Zamenhof, honora Prezidanto; **S-roj Carlo Bourlet** kaj **G. Vila Roca**, Prezidantoj; **S-ro J. Pujol**, Sekretario; **F-ino Maria Mas**, **D-ro René Artigues**, **Barono F. de Ménil**, Komitatanoj.

Klarigoj pri la laboro kaj decidoj de la Subkomitato de la «Floraj Ludoj», estos sciigataj per tuj aperonta cirkulero kiu estas jam en presejo.

Rilate al la vojaĝo, ni sciigas ke, en la nuna momento, estas specialaj biletoj por kongresanoj, tre malkaraj, sed, ĉar oni avertis nin ke la prezo estos ŝanĝata post nelonge, ni prokrastas diri la definitivan koston ĝis kiam tiu ĉi afero estos firme decidita.

Ĉio aŭguras ke la Barcelona Kongreso estos la plej granda sukceso atingita de Esperanto eĉ la nomoj helpas nin!!! vidu!

MiKaelo	CasEs.
AlfOnso	Sabadell.
FredeRich	Pujolà.
JAume	SalEs.
GerMaine	Rebours.
GerOni	VilA.
JasciNto	BremoN.
RAmon	ClaramunT.
CarLo	BOurlet.



I^a OFICIALA POŝTA KARTO

Por la LOKA ORGANIZA KOMITATO
 La Prezidanto de «Propaganda Fako»,
D-ro J. Bremon Masgrau

FLORAJ LUDOJ

La Sub-Komitato de la Floraj Ludoj esprimas sian koran dankemecon al nia Majstro D-o Zamenhof kiu ne nur bonvolis akcepti la titolon de Honora Prezidanto de la Festo, sed ankaŭ donacis premion por la Ludoj.

De post nia lasta numero, oni ricevis multajn novajn premiojn:

Novaj temoj proponitaj de Kongreslandanoj. —

ILIAJ MOŝTOJ ALFONSO XIII kaj VICTORIA EUGENIA DE BATTEMBERG, Gereĝoj de Hispanujo. — Monografio pri hispana pentristo. — 250 pezetoj (100 sm.).

HISPANA SOCIETO POR LA PROPAGANDO DE ESPERANTO. — Originala monologo prezentbla. — 25 frankoj (10 sm.).

« ESPERANTO KAJ PATRUJO », Grupo el Barcelono. — Esperanto kiel diskonigilo de ideoj. — *Arta objekto*.

Novaj temoj proponitaj de alilandanoj. —

D^o L. L. ZAMENHOF. — Regno de homoj. — Plena kolekto de la verkoj de l' Majstro riĉe binditaj kaj kun manuskripta dediĉo.

PRESA ESPERANTISTA. — Fideleco. — Belega portreto de D^{ro} Zamenhof.

LINGVO INTERNACIA. — Ni fosu nian sulkon! — Libro el la kolekto de L. I. (aŭ de la Presa Esp. Societo), laŭ elekto de la premiita kandidato, valoro fr. 25 (10 sm.).

JUNA ESPERANTISTO. — Juneco. — Libro el la katalogo de la « Presa Esperantista Societo », laŭ elekto de la premiita kandidato, valoro fr. 12,50 (5 sm.).

BELGA ESPERANTISTO. — Loka-regiona legendo (laŭ libera temo), prozaĵo de 4, 5 paĝoj. — Branĉo de rozujo el fero forĝita longa je 45 cm. Belega artaĵo, specialaĵo de la urbo Antverpeno.

GERMANA ESPERANTISTO. — Internacia frateco per Esperanto. — Plena kolekto de la verkoj de la frino Möller und Borel, riĉe binditaj.

POLA ESPERANTISTO. — La plej bona monologo, preferinde el la vivo esperantista. — 1^a Bele binditaj jarkolekto de « Pola Esperantisto » por la jaro 1908 kaj ĉiuj literaturaj eldonoj de « P. E. », kiuj aperos antaŭ la Barcelona Kongreso. — 2^a Jarkolekto de « P. E. » por la jaro 1908 kaj ĉiuj literaturaj eldonoj de « P. E. » en simplaj kovriloj. — 3^a Jarkolekto de « P. E. » por la jaro 1908 bele bindita.

FRANCA ESPERANTISTO. — La plej bona originala rakonto ne pli longa ol du paĝoj aŭ kvar kolonoj kiel la folietono de Franca Esperantisto. — 25 frankoj (10 sm.).

THE BRITISH ESPERANTIST. — La historio de Esperanto verkota en de 3,000 ĝis 6,000 vortoj (40 sm.).

TRA LA FILATELIO. — Poezio pri filatelio. — 20 frankoj da poŝtmarkoj laŭ katalogo.

Al ĉiuj la Sub-Komitato esprimas sian koran dankecon.

Per tuj aperonta cirkulero oni sciigos al la esperantistaro plenajn detalojn pri la *Unuaj Esperantistaj Floraj Ludoj*.

*

La Komitato sendas sian varman dankon al la gazetoj kiuj bonvolis represi la unuan cirkuleron, kaj petas al ĉiu esperantista ĵurnalo pri la represigo de ĉiu cirkulero aperonta.

*

En nia proksima numero, ni povos sciigi la nomojn de la membroj kiuj formas la Sub-Komitaton de Propagando de la V^a Kongreso.

EL USONO

Dum la mallonga, tamen varmega somero de Nova Anglujo, la miloj da personoj kiuj loĝas en la nomata « Pli granda Bostono », aŭ, en multaj aliaj urboj kaj urbetoj kiuj apude ĉirkaŭis ĝin, kaj kiuj pro iliaj okupaĵoj ne povas pasigi longdaŭran libertempon for de la urbo, trovas ludtempon kaj refreŝadon ĉe la multaj lokoj de amuzo kaj de historia intereso kiuj sin trovas laŭ la bordoj de la bela Massachusetts'a golfeto, kaj kiujn lokojn oni povas atingi per vaporŝipo, vagonaro, aŭ elektra-tramo en templimo kiu diversas de horoduonon, ĝis tri aŭ kvar horoj — pasigi kelkajn horojn ĉe la elektita loko, kaj hejmen reveni la saman vesperon.

Estas dudekoj da parkoj kiuj provizas ĉiuspecajn amuzajojn, banejojn, teatrojn, danshalojn, bestejojn, — fakte, kio ajn povas amuzi aŭ ekstremitigi la vizitantojn kaj samtempe ekkapti por la posedanto rikolton da moneroj. Ĉiutage dum la someroj sed precipe dimanĉe, miloj da personoj forlasas la varmegojn de la urbo por serĉi unu el tiaj ludlokoj. Por priskribi ĉi tiujn lokojn detale, oni bezonus verki grandan libron, sed mi en mia mallonga artikolo nure intencos priskribi unutagan viziton al eble la plej interesplena el la apudaj lokoj, kiu havas grandan historian intereson, al kiu ĉiujare celas miloj da kvazaŭaj pilgrimantoj, kaj kiu estas riĉa pro memorigoj de la bravaj pioniroj, kiuj antaŭ tricent jaroj fondis tiun porcion da Usono nomatan « New England » (Nova Anglujo) en kiu sin trovas la plej karakteriza tipo, preskaŭ sufiĉe karakteriza por esti nomata nacia tipo; — tio estas la Janko (Yankee) Tiu nomo apartenas nur al la loĝantoj de Nova Anglujo, sed en lastaj jaroj niaj transoceanaj amikoj ĝin donas al ĉiu Usonano.

La loko pri kiu mi parolas estas la malnova urbo Plymouth, kie en la vintro de la 1626^a elŝipiĝis malgranda bando da pilgrimoj, kiuj serĉantaj religian liberecon, forlasis sian anglan hejmon, kaj de kiu devenas la plej granda porcio de la loĝantaro kiu sin trovas en ĉi tiu parto de la lando, kiu portas la nomon de la patrino lando, kaj el kiu, de tempo al tempo, dum la jarcentoj, elmigris la plej aventuremaj el la junularo en la pli sovaĝajn porciojn de la lando, kaj kies fortega karaktero tiom estas farinta por starigi la nacion pri kiu ni estas tiel fieraj.

Ĉar ni estas spertaj marveturistoj kaj ne timas la marmalsanon, estos pli agrable se ni per vaporŝipo vojaĝas, kvankam la timemuloj povas atingi la saman celon per la vagonaro, aŭ eĉ per la ĉieestanta elektravagono. Estas la naŭa matene, kaj ĉe la enŝipejo sin trovas bela vaporŝipo, sufiĉe granda por porti milon da popolo; la ferdeko jam estas plena de amaso de gajaj vojaĝantoj; la ŝipestro donas la signalon, kaj ni komencas nian kvindekmejlajn vojaĝon laŭ la tiel nomata « suda-marbordo ».

Postlasante la internan havenon, ni renkontas majestan transoceanan vaporŝipon, kiu ĵus alvenadas post sia longedaŭra vojaĝo, kaj sur kies ferdekoj ni povas vidi amason da personoj, kelkaj el kiuj ĝojiĝas pro la revido de ilia nasklando, aliaj kiuj je la unua fojo vidas la bordojn de la tero kiu entenas por ili tiom da estonta espero, kaj la promeson pri nova hejmo. Estas ankaŭ videblaj multaj aliaj ekskursaj ŝipoj kiuj celas la diverse aliajn ludlokojn, ankaŭ la pli malrapida sed pli pentrinda velŝiparo.

Estas nenia manko de privataj ŝipetoj, kiuj diversas de la boatoj kiuj vojaĝas laŭ la marbordo; videbla estas ankaŭ la oceanvojaĝanta ŝipo de la milionulo. Inter la ludistoj estas ankaŭ la laboristoj; trenŝipoj, karboŝarĝbarkoj,

velŝipoj kaj la ŝipetoj de la fiŝkaptistoj, kiuj per neĝoblankaj veloj forveturadas al la «grandaj rifoj», kie la sentimaj maristoj, batalantaj kontraŭ la sovaĝaj naturelementoj, serĉas ŝarĝon da gadoj.

Unu alian ŝipeton mi devas preparoli. Ĝi estas belega vaporŝipeto, havanta kelkajn ferdekojn kiuj per grandaj fenestroj estas enfermataj, kaj sur kies fumotubo oni vidas grandan ruĝan krucon. Ĝi estas la flosanta hospitalo, vaporŝipeto kiu pro la bonkoreco de la Boston'aj urbanoj estis speciale konstruata kaj provizata kiel hospitalo por la malsanaj infanoj de la malriĉuloj, kiuj loĝas en la dense loĝigitaj kaj nesanaĵaj kvartaloj el Bostono kaj la apudaj urboj. Ĝi havas ĉiujn eblajn komfortaĵojn kaj konvenaĵojn de moderna hospitalo, kaj portas stabon de kuracistoj kaj malsanulistinojn kiuj zorgas pri la pacientetoj. Ĉiutage, dum la somero, ĝi matene forveturas el la haveno, portanta sian ŝarĝon da suferantetoj kaj ankriĝas en la ŝirmo de unu el la multaj insuloj el kiuj la golfeto estas plena; vespere ĝi revenas kaj elŝipigas la infanojn kaj patrinojn kiuj ĝin okupas nur dum la tago, tenante dum la nokto ian kvanton da konstantaj pacientoj kiuj estas tro malsanaj por hejmen reiri. Ĝi havas specialan aparaton por malvarmigi, purigi, kaj sekigi la atmosferon enirantan, kaj en la daŭro de somero, dank' al ĉi tiu bonfarado, multe da infanoj trovas sanon kaj eĉ vivon.

Nun ni vojaĝas laŭ la marbordo, —neniam pli distance ol kelkaj mejloj, — sur kiu ni observas nerompitan vicon da urboj, urbetoj, hoteloj, dometoj, tendaroj k. t. p., kie pasigas la someron multe da urbaj loĝantaroj, ofte irantaj al la urbo dum la tago por diversaj okupadoj, noktantaj meze de la malvarma marbloveto. Sur la supraĵo de la maro ni vidas centojn da hele pentritaj, flosantaj ŝipetoj, kiuj signas la lokon de omaraj kaptiloj, kaj okaze ni vidas la fiŝkaptiston en sia boato, kiu remiras de unu al la alia el ili, kaj per la alligata ŝnureto eltiras el la akvo la kaptilojn, kaj malplenigas ilin. Malproksime, sur la tero ni vidas strangan, altegan maston, ĉirkaŭitan de retaĵo de metalfadenoj, kio, informas nin kompleza kunvojaĝanto, estas la semetalfadena telegrafilo per kiu oni komunikigas kun la malproksimaj ŝipoj kiam ili alproksimiĝas aŭ forveturas.

El la alia flanko de la ŝipo ni povas elvidi trans la larĝa golfo, kaj distance, malklare oni povas vidi la pinton de «Cape Cod» (promentario-gado), kie la pilgrimoj unue surpaŝis sur la teron, antaŭ ol trovi la finan restejon ĉe Plymouth.

Meze de nia vojaĝo, ni preterpasas la granitan lumturon kiu staras sur la subakva ŝtonego, «Minot's Ledge». Ĉi tiu lumturo leviĝas en la aero ĝis granda alteco, verŝajne el la profundaĵoj de la oceano, kaj dum la ventega sezono estas tute nealirebla. Dum multaj tagoj kaj semajnoj la fidelaj gardistoj, — memvolaj malliberuloj, — per la brila lumo kaj la sonorilego avertas la egale bravajn maristojn pri la kaŝita kaj danĝerplena rifo. Tiom ventega estas ĉi tiu loko, ke, antaŭ multaj jaroj, alia lumturo kiu tie staris, estis forĵetata de la ventoj kaj ondoj kaj la gardistoj dronis.

Sed, pro la freŝa marbloveto ni iom malsatiĝas, kaj tial, ni malsupreniras en la ŝipon kie oni trovas bonegan restoracion, kie estas aĉeteblaj viandbulkoj, kukoj, bananoj, oranĝoj, citronoj kaj aliaj specoj de frukto, ankaŭ diversspecaj nealkoholaj trinkaĵoj. Revenante al la ferdeko ni vidas ke ni alproksimiĝas al la torda kanalo kiu kondukas al la urbo Plymouth. Trans la teron ni vidas en la vilaĝo «Duxbury», la monumenton starigitan el la memoro de Kapt. «Myles Standish», unu el la plej gloraj kaj bravaj el la pilgrimoj, pri

kies amindumado nia fama poeto Longfellow kantas en sia bone konita «Courtship of Myles Standish.»

Iom malrapide kaj zorge la ŝipo sekvas laŭ la serpentinia marvojo ĝis kiam ni fine atingas la elŝipejon. Tuj kiam ni elsipiĝas ĉio estas konfuzo; laŭ la vojo estas sennombraj veturiloj kies kondukistoj petas ke ili povu nin konduki al la multaj intereslokoj; sennombraj buboj enpuŝas en niajn manojn, kartojn kiuj portas la reklamojn de hoteloj, restoracioj, butikoj k. t. p.; aliaj buboj vendadas la ĉietrovitan poŝtkarton, kaj mil kaj unu aliajn memoraĵojn de la urbeto.

Preterpasante ĉi tiujn, ni trafas la teron, kie sin trovas la unua vera memorigo de niaj praaĵoj, kiu batigas niajn korojn pro fiereco. Malsupra granita baldakeno, ĉirkaŭita de fera stangetaro, estas la fama «Plymouth'a ŝtonego» sur kiu la pilgrimoj unue paŝis kaj kiun ni, —la nuntempaj pilgrimantoj, — estas permesataj ke ni ĝin per niaj piedoj premu. Se ni portas fotografilon ni kredeble fotografas ĉi tiun faman monumenton, kaj poste ni daŭrigas nian iom rapidan iradon tra la urbeto, irado kiu estos ja tro mallonga por vidi dekonon el la interesplenaj lokoj kaj objektoj.

Nia vizito enhavas kelkajn dometojn kiuj postvivis la tri centjarojn, la antikvan tombejon en kiu ripozas la restaĵoj de niaj antikvaj herooj, la malnovan, juĝejojn, la monumenton el bele ĉizilita granito, starigitan antaŭ kvindek jaroj al la honoro de la pilgrimoj, kaj fine, la «Pilgrimhalo», kiu estas plenata de sennombraj, senprezaj memoraĵoj de la fruaj tagoj de la kolonio. Ĉi tie sin trovas seĝoj, luliloj, ŝpiniloj, vestaĵoj, glavoj, libroj, skribaĵoj, kaj sennombraj aliaj objektoj, uzitaj de la antikva loĝantaro de la tiam sovaĝa regiono. Ili ne estas en tia konfuzo kia mi estas priskribinta, sed bone aranĝitaj, katalogitaj kaj protektitaj kontraŭ difektado. Oni tie ankaŭ trovas multajn pentraĵojn kaj gravaĵojn pri personoj kaj lokoj kunigataj kun la antikva historio de nia naskiĝanta nacio. Ĝus tiam, kiam ni komencas eltrovi tion, kion ni deziras vidi, la fajfilego de la ŝipo nin avertas ke alvenas la tempo por nia foriro, kaj kontraŭvole ni devas postlasi la interesplenan lokon, sed ni forte decidis ke ni altempon revenos por pli detala kaj sistema elvidado de la riĉa trezorejo, —afere al kiu oni povus profite doni multajn tagojn, — sed kiun ni, — laŭ la kutima amerikana vidmaniero kiu tiom amuzas niajn pli moderajn europajn amikojn, — estas tre supraĵe vidintaj. Sed, ni devis rapidi, ĉar en ĉi tiu lando, ĉiu, ĉiam rapidas. Ni rapide naskiĝas, vivas rapide, kaj ofte rapide mortas.

Laŭ la supredirita maniero, ni, la laborantoj en la abelujo, ekkaptas okazan libertagon, kaj malgraŭ la verŝajna rapido kaj konfuzo, ni hejmen revenas, spirite refreŝigataj, korpore refortigitaj de la vivodonanta spiro de la oceano, kaj pretaj por reeniri la kuradon al la pano-celo ĝis tia tempo kiam ni povos ree forŝteli por ni alian libertagon.

D-RO C. H. IRSENDEN.
Newton Centre, Mass.

TAJLORA KURAGECO (FABELETO)

En malgranda vilaĝo loĝis tajloro, kiu serĉis sian laboron en aliaj najbaraj vilaĝoj, kiam ĝi mankis en sia tajlorejo.

Iam malfrue kaj mallume li revenis hejmen pli rapide ol kutime. Li marŝis ĉirkaŭŝirmite per dika mantelo; ĉar la vetero estis malvarma, por mallongigi la interspacon, li elektis rektan, ne ofte trairitan vojeton, ĉar li vere tre baldaŭ deziris alveni al sia familio.

La vento tiun nokton forte blovis, kaj la tajloro, iom timema, trapasante

vojkruciĝon, sentis sin kaptita, kvazaŭ iu estus lin preninta per la mantelbordo. La malfeliĉulo sin kredis surprizita de iu rabisto, kaj humile ekkriis: « Lasu min, ĉar mi estas tajloro! » Tamen, la supozita kaptanto silentis, kaj ĝi nenie ellasis sian kaptajon. « Lasu min, ĉar mi estas tajloro! » senĉese ripetadis la malfeliĉa kaptito, kaj tiel, ripetante la preĝojn, estis forpasinta la tutan nokton.

Kiam la taglumo alvenis, ankoraŭ la tajloro daŭrigis sian preĝadon; sed hazarde li turnis sian kapon, kaj suzprizplene rimarkis ke, la *kruelega kaptinto* estis branĉo el kreskaĵo, kies dornoj alkroĉis lin per sia mantelo, kaj lin haltigis.

Kiam la tajloro vidis tion, eliris sian tondilon, kaj *brave* tranĉis la malbena tan branĉon, ekkriante: *Mi same tranĉus vin, kvankam vi estus homo!*

F. PALASI.

El «*Esperanto Semo*».

LETERO EL KUBO

S-ro Direktoro de TUTMONDA ESPERO.

La semo disjetita en tiu-ĉi insulo de la «Grupo Esperantista Kataluna» el Santiago, komencas frukti kiel estis esperinde.

Post la granda individua propagando farita de la rondo de esperantemaj katalunoj loĝantaj en Kubo, kiu prenis sur sin la taskon ĝin divastigi, hodiaŭ ni povas certigi vin pri la konstituo de la unua kuba esperanta asocio kiu konsistos el kubanoj kaj katalunoj, kaj kiu estos definitive fondita en ĉi-tiu urbo sub la nomo «Esperantista Societo el Oriento».

Kunvenine en prepara kunsido la membroj de la societo inter kiuj ĉeestas la plej gravaj personoj el la scienclularo, oni elektis unuanime la sekvantan Direktan Komitaton:

President: Dr. Pere Roig Tejera, catedratic de Lletres de l'«Institut Provincial d'Orient».

Viĉ-president: Sr. Manel Mateos, professor d'Ensenyances.

Secretari de Correspondencia: Sr. Jordi Chávez Milanés, catedratic d'Agricultura de l'«Institut Provincial d'Orient».

Viĉ-secretari de Correspondencia: Sr. Salvador Carbonell Puig, dependent de comerç.

Secretària d'actes: Srta. Maria Caro, directora de col'legi public.

Viĉ-secretària d'actes: Srta. Mercè Dimas, directora de col'legi public.

Tresorer: Sr. Andreu Navarrete, catedratic d'Agrimensura de l'«I. P. d'Orient».

Viĉ-tresorera: Srta. Maria Cros, professora de primera ensenyança.

Vocals: Dr. Francisco Marcer, viĉ-director de l'«Institut Provincial d'Orient». — Doctor Josep Grimany, catedratic de Ciencias de l'«Institut Provincial d'Orient». —

Dr. Antoni Guernica, metge. — Srta. Carme Taquechel, professora normal. —

Srta. Rafela Infante, professora normal. — Sr. Lluís Tamarellé, consul d'Haití. —

CARTA DE CUBA

Senyor director de TUTMONDA ESPERO.

La llavor lanĉada en aquesta illa pel «Grupo Esperantista Català», establert aquí a Santiago, comença ja a donar els esperats fruits.

Després de la grossa propaganda individual que han vingut fent el nombre de simpatizadors catalans amb què comptava l'Esperanto aquí a Cuba i que s'imposaren la misió de propagar-lo, avui ja us podem donar per segura la constitució de la primera entitat esperantista cubana, que, composta de cubans i catalans, quedarà definitivament establerta dins pocs dies en aquesta ciutat, portant per nom «Sociedad Esperantista de Oriente».

Reunits en sessió preparatoria ls components de la mateixa, entre ls quals figura lo més granat en el ram del saber, quedà per unanimitat elegit el següent Concell Directiu:

President: Dr. Pere Roig Tejera, catedratic de Lletres de l'«Institut Provincial d'Orient».

Viĉ-president: Sr. Manel Mateos, professor d'Ensenyances.

Secretari de Correspondencia: Sr. Jordi Chávez Milanés, catedratic d'Agricultura de l'«Institut Provincial d'Orient».

Viĉ-secretari de Correspondencia: Sr. Salvador Carbonell Puig, dependent de comerç.

Secretària d'actes: Srta. Maria Caro, directora de col'legi public.

Viĉ-secretària d'actes: Srta. Mercè Dimas, directora de col'legi public.

Tresorer: Sr. Andreu Navarrete, catedratic d'Agrimensura de l'«I. P. d'Orient».

Viĉ-tresorera: Srta. Maria Cros, professora de primera ensenyança.

Vocals: Dr. Francisco Marcer, viĉ-director de l'«Institut Provincial d'Orient». — Doctor Josep Grimany, catedratic de Ciencias de l'«Institut Provincial d'Orient». —

Dr. Antoni Guernica, metge. — Srta. Carme Taquechel, professora normal. —

Srta. Rafela Infante, professora normal. — Sr. Lluís Tamarellé, consul d'Haití. —

Sr. Josep R. Villalón, director de col'legi public. — Sr. Josep Coma Moré, dependent de comerç.

Krom la cititaj, ankaŭ kalkulas la societo tridekon da anoj, inter kiuj estas citindaj, la eks-Prezidanto de la Dominika Respubliko Generalo Wosh Gil, la urbestro de Santiago advokato J. M. García, kaj granda aro da kuracistoj kaj advokatoj, ĉiuj entuziasmaj partianoj de la Zamenhofa lingvo.

Notinda estas ankaŭ la intereso vekiginta ĉe la kubanoj por la propagado de la lingvo Esperanto; ili preparigas por helpi nin per siaj tutaj klopodoj. Kiel oni povas vidi, ĉe la Direkta Komitato ĉeestas kelkaj inteligentaj kaj simpatiaj fraŭlinoj plenaj je entuziasmo por batali ĝis la definitiva triumfo de la utila lingvo internacia.

Oni parolis jam pri la publikigo de ĵurnalo kiu estos organo de la esperantistaj societoj el Kubo, kaj pri la starigo de delegitoj en diversaj gravaj urboj.

Ni finigas gratulante la simpatian kaj kleran santiagoanon S-ro Petro-Paŭlo Valiente kaj la inteligentan D-ron Jozefo M. Esquin, ĉar ili estis la unuaj kubanoj kiuj ĉe Santiago ekkonstatis la gravecon de la granda esperanta movado, atingante per iliaj entuziasmoj la fondon de la nomita societo.

Pri ili ni povas diri ke, kune kun niaj bonaj amikoj kaj sampatrujanoj D. Balaguer Forment, S. Carbonell i Puig kaj J. Oristrell estas la veraj enkondukintoj de Esperanto en tiu-ĉi insulo. Ni ne povas fini ne sendante niajn plej varmajn laŭdojn al la simpatiaj kubaj samideanoj fratinoj Manuelino kaj Julino Castro kiuj subtenas tre alte la esperantan standardon en la ĉefurbo de la insulo.

KATALUNA SAMIDEANO

Santiago el Kubo Novembro 1908.

A més dels ja esmentats, compta la societat amb uns trenta socis més, trobant-s'hi, entre altres no menys distingits, l'ex-president de la República Dominicana general Wosh i Gil, el president del Ajuntament d'aquesta ciutat, advocat D. Josep M.^a García, i un bon estol de metges i advocats, tots ells partidaris entusiastes de la llengua zamenhofiana.

També, entre les dames cubanes, ha despertat viu interès l'expansió de l'idioma Esperanto, i es disposen a ajudar-nos amb tot llur esforç. Com se pot veure, ja figuren a la Directiva un agrupament de simpatiques i intel·ligents senyoretas, que venen plenes d'entusiasme al nostre costat pera lluitar pel definitiu triomf de la llengua internacional.

Se tracta ja de la publicació d'un periodoc que sigui portant-veu dels esperantistes de Cuba, com també d'establir delegacions en altres poblacions importants.

I acabem aquí felicitant al simpatie i distingit santiagoès D. Pere Pau Valiente i a l'intelligent doctor D. Josep M. Esquin, per haver sigut ells els primers cubans que a Santiago s'han donat compte de l'importancia del gran moviment esperantista, obtenint amb llurs entusiasmes la constitució de la societat esmentada.

